



Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, redakcioj de gazetoj kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj.

Estrara Komunikado 2016-01 sendita de Závažná Poruba en la 9a de januaro, 2016

Verda turismo diskutita en AMO 18

Sub la termino ‘verda turismo’ oni kutime komprenas ekologieman vojaĝadon kaj restadon, kion esperantistoj certe subtenos, sed niakaze la termino celas turisman agadon inter esperantistoj.

La gastiga aranĝo por la 18a Seminario Pri Aktivula Maturigo estis la 34a Poludnica, nomata laŭ renoma kaj apuda monto.



Ambaŭ aranĝoj estis solene malfermitaj en la vilaĝdomo de Závažná Poruba flanke de verina ĥoro kaj de la komunumestro, RSDr., Mgr. Dušan Migaľa (Foto de M. Matúšov).

La temo de AMO 18 estas: ‘Kiel organizi E-vojaĝojn kaj turismajn ekskursojn’. Ambaŭ aranĝoj estis dediĉitaj al la memoro de la multjara turisma aganto Andreo Grębowski.

Trideko da homoj partoprenis en Poludnica, kaj dudeko en AMO. Jen programresumo.

Ján Vajs (SK) gvidis la malferman sesion: ‘Diferencoj inter vojaĝoj organizitaj de vojaĝoficejoj kaj de esperantistoj’, kiu disvolviĝis kune kun praktika ekzerco.

Stanislav Mandrak (PL) prezentis bildan kaj vortan omaĝon al la laboro tra la jaroj de Andreo kaj Regina Grębowski kaj helpantoj en Bydgoszcz. La notojn pretigis Zdzisław Glajcar.

Dorota Rodzianko (PL/SK) konigis praktike utilajn konsilojn ‘Kiel vojaĝi malmultekoste’, trajne, aviadile, buse, aŭte, unuavice ene de Eŭropo, kie ne mankas ebloj.

Michal Matúšov (CZ/SK) traktis la temon ‘Turismaj informoj en interreto’ – kaj montris per projekciado la eblojn kaj frustraciojn de reta serĉado.

Petro Baláz (SK) rakontis pri la ekskursaj ebloj lige kun la 101a Universala Kongreso en Nitra.

Fine de la ĵaŭda programo (la 7an de januaro), Petro Chrdle, malhelpita lastmomente partopreni, alparolis la seminarianojn per skajpo pri la temo ‘Bonaj kaj malbonaj spertoj el organizado de

turismaj aranĝoj'. Li tiris ĝeneralajn konkludojn, konstatojn kaj avertojn, spicitajn per praktikaj kaj foje harstarigaj anekdotoj pri okazintaĵoj.

Rande de AMO 18, Eva Fizeľová kaj Johannes Mueller registris du podkastajn sesiojn, kun publika aŭskultado. La unua (ĉe 25 minuta) temis pri la unua intervjuo en nova serio: 'Movada Vidpunkto' kun Petro Baláz kaj Ján Vajs pri la kongrespreparoj, Julia Noe prizorgis publikan mikrofonon por akcepti demandojn. La dua postataga registriĝo okazis kun Jan Vajs pri speleologio – grotesplorado – tra la mondo. Li rakontis fascinajn kaj foje (denove) harstarigajn eventojn. En AMO 6 dum Kaest en novembro 2014 la podkasta teamo prezentis tiun komunikformon.

En la vendreda vespero okazis daŭrigo: Alexander Zdechlík (PL) parolis pri 'Organizado de E-vojaĝoj al malproksimaj landoj', ĉefe Japanio kaj Brazilo, kun abundaj bildoj pri la bieno/lernejo 'Bona Espero'. Prezenton de geografia kvizo prizorgis Magdaléna Feifičová, sekvata de kreita lumbilda prezento por bone prezenti la analizon de Bertil Wennergren el la verko PoMEGo pri la nuna stato de la traktado de landnomoj kaj iliaj derivaĵoj.

La partoprenantoj de Polundica rilatas ne nur teorie pri tiu montpinto. En la sabato (la nuna verktago) la plimulto ekgrimpis al la pinto (1540m), survoje paŭzanta por aldoni pliajn pesitajn, katalogitajn ŝtonojn al Esperanto-obo. Mankas nur 200 kg da ŝtonoj por atingi milon kaj tiel povi oficiale registri la monumenton kun ŝtonoj el multaj dekoj da landoj kiel ZEO.



Dimanĉmatene okazos la ferma tago de la seminario, en kiu ni povos arigi rekomendojn al diversaj grupoj, por akceli la uzon de Esperanto en la turisma kampo.

Supre kaj sekvapaĝe jen fotoraportaĵo pri la seminario, danke al fotoj faritaj de Peter Rybin.

Prezentantoj Ján Vajs (dekstre) kaj Dorota Rodzianko, kies temo pri malmulte kosta vojaĝado estas eventuale legebla sur la apuda ekrano.



Maldekstre:
Atenta publiko.
Sube maldekstre:
Stanislav
Mandrak omaĝas
al Andreo
Grębowski, kies
protreto videbla
ekrane. Sube
dekstre: Alex
Zdechlík.



Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.